

## Ekiro Orienten

Je la vespero de tiu tago, mi manĝis kun Intŝu-tŝuna kaj Winnetou, kiel ĉiam. Mia indiana amiko forlasis min post la manĝado. Mi volis sekvi lin, sed tiam la ĉefo komencis paroli pri la aventuro de Sam kun Kliuna-ai, kaj tiam temigis la rilatojn inter blankuloj kaj indianuloj. Mi rimarkis, ke li volis eksci, kiel mi pensis pri tio. „Ĉu mia juna frato Old Shatterhand opinias tian geedziĝon esti legitimaj, aŭ nelegitimaj?“ li demandis.

„Se ĝi estas deklarata de pastro, kaj la indianin antaŭe kristaniĝis, mi ne vidas ion kontraŭlegan en ĝi“, mi respondis.

„Do mia frato neniam akceptus *squaw*:on kiel sia edzino, tiel kiel ŝi estas, ĉu?“

„Ne.“

„Kaj, ĉu estas malfacila estiĝi kristano?“

„Tute ne.“

„Ĉu tia *squaw* rajtas tiam estimi sian patron plu, eĉ se li ne estas kristano?“

„Jes. Nia religio postulas de ĉiu infano, atenti kaj estimi la gepatrojn.“

„Kiun mia juna frato preferus, ĉu ruĝan aŭ blankan virinon?“

„Al tio mi ne povas facile respondi. Ĝi dependas de la voĉo de la koro. Kiam ĝi ekparolas, oni ĝin obeas, egale, kiun haŭtkoloron la *squaw* havas. Antaŭ la Granda Spirito ĉiuj homoj egalas. Tiuj, kiuj agordas unu al la alia, kaj estas naskitaj unu por la alia, trovos unu la alian.“

„Howgh!“ la ĉefo certigis. „Kiuj agordas, trovos unu la alian. Mia frato parolis tre prave, li ja ĉiam parolas prave kaj bone.“

Pro mi, tiu temo estis finigita. Ke indianino antaŭe estiĝu kristano, se ŝi volas edziniĝi, tion mi emfazis. Por Nŝ-ĉi, mi deziris la plej bonan kaj plej noblan ruĝan militiston kaj ĉefon. Sed mi ne estis veninta en la sovaĝan okcidenton pro elekti *squaw*:on. Eĉ ne jam estis certa, ĉu mi fakte ajn iam edziĝus.

Kiun konsekvencon mia interparolo kun Intŝu-tŝuna havis, mi ekkonis du tagojn poste. Li kondukis min malsupren en la unuan etaĝon, kie mi neniam antaŭe estis. Tie estis, en speciala ĉambro, niaj mezuriloj.

„Vidu al tiuj aĵoj, ĉu io mankas“, la ĉefo postulis de mi.

Mi trovis, ke nenio estis perdita. La iloj eĉ ne estis damaĝitaj, neatentinte kelkajn kurbigetojn, kiujn mi povis facile ripari.

„Tiuj aĵoj estis medicino al ni“, li diris. „Tial ili estis tenataj tiel zorge. Mia juna frato prenu ilin. Ili reestas lia posedaĵo.“

Mi volis danki al li pro tiu bona dono, sed li defendis sin kontraŭ la dankon, kaj diris:

„Ni prenis ilin, ĉar ni pensis, ke vi estus nia malamiko. Sed nun vi estas nia frato, kaj rericivu ĉion, kion Vi posedas. Kion vi nun faros kun tiuj iloj?“

„Kiam mi iros for de ĉi, mi kunprenos ilin, pro redoni ilin al la homoj, de kiuj mi ricevis ilin.“

„Kie loĝas tiuj homoj?“

„En St. Louis.“

„Mi konas la nomon de tiu urbo, kaj mi ankaŭ scias, kie ĝi estas. Winnetou estis tie, kaj rakontis pri ĝi al mi. Do vi volas foriri de ni?“

„Jes, sed ne jam nun.“

„Ni bedaŭros tion. Vi estiĝis militisto de nia tribo. Mi eĉ donis al vi la forton kaj la honoron de ĉefo de la apaĉoj. Ni kredis, ke vi restos ĉiam ĉe ni, kiel Klekih-petra. Laŭ lia volo, vi estiĝis la frato de Winnetou, sed tamen vi volas forlasi lin. Ĉu tio ne estas kontraŭdiro?“

„Ne. Fratoj ne devas ĉiam esti kune. Ili ofte disiras, kiam ili faru malsamajn taskojn.“

„Sed ili ja revidiĝos, ĉu?“

„Jes. Vi revidos min, ĉar mia koro rekondukos min al vi.“

„Aĵn kiam vi venos, granda plezuro estos en ni. Mi tre bedaŭras, ke vi volas forlasi nin. Ĉu vi ne povus senti vin same feliĉe ĉe ni?“

„Mi ne scias. Mi estis tie ĉu nur dum tiel mallonga tempo, ke mi ne povas respondi al tiu demando. Certe ĝi estos tiel, kiel du birdoj sidas en la ombro de unu arbo. Unu nutriĝas per la fruktoj de la arboj, kaj restas tie. La alia bezonas alian manĝaĵon, kaj ne povas resti tie longan tempon, li foriru.“

„Tamen vi povas esti certa, ke ni donos al vi ĉion, kion vi bezonas.“

„Tion mi scias. Sed kiam mi parolis pri manĝaĵo, mi ne celis al la nutraĵo, kiun la korpo bezonas.“

„Mi scias, ke vi plavizaĝoj ankaŭ celas al la manĝaĵo de la spirito. Tion mi eksciis de Klekih-petra. Tiu manĝaĵo mankis al li ĉe ni, tial li estis kelkfoje tre malgaja. Vi estas pli juna, do vi sopiras for, eĉ plie ol li. Tial vi iru. Sed ni petas al vi reveni. Eble vi tiam estos ŝanĝinta vian opinion, kaj komprenos, ke vi povas farti bone ankaŭ ĉe ni. Sed mi ŝate volas sciĝi, kion vi faros, kiam vi estos reveninta en la urbon de la palvizaĝoj.“

„Tion mi ne scias jam hodiaŭ.“

„Ĉu vi restos ĉe la blankuloj, kiuj volas konstrui la vojon de la fajroĉevalo?“

„Ne.“

„Per tio vi agas prave. Vi estiĝis frato de la ruĝaj viroj, kaj devas ne helpi al la palvizaĝoj, kiuj volas trompi nian landon for de ni. Sed tie, kien vi iros, vi ne povos vivi per la ĉasado kiel tie ĉi. Vi havu monon. Winnetou diris al mi, ke vi estas malriĉa. Vi estus ricevonta mono, se ni ne estus atakinta vin. Tial mia filo petis min, doni anstataŭon al vi. Ĉu vi volas oron?“

Li rigardis min tiel arde dum tiu demando, ke mi gardis min jesi al ĝi. Li volis ekzameni min.

„Ĉu oron?“ mi diris. „Vi forprenis nenion de mi, tial mi ne ekspektu ion de vi.“

Tio estis diplomacia respondo. Mi sciis, ke ekzistas kelkaj indianoj, kiuj konas la trovejojn de valoraj metaloj. Ili neniam ekideus malkovri ajn iun el tiuj ejoj al blankulo. Intŝu-tŝuna verŝajne konis tian ejon.

„Ne, ni ne rabis ion de vi“, li respondis. „Sed per ni, vi ne ricevos, kion vi meritas. Tial mi volas kompensi vian perdon. En la montaro estas oro, en granda amaso. La ruĝaj viroj konas la ejojn, kie ĝi troveblas. Al ili nur necesas iri tien, kaj preni ĝin. Ĉu vi deziras, ke mi alportos iom por vi?“

Cent aliaj homoj estus akceptintaj tian oferton, kaj — ricevintaj nenion. Tion mi ekkonis per la stranga, atenduma vido de Intŝu-tŝuna.

„Mi dankas al vi!“ mi diris. „Sed eĉ, ke mi malriĉas, tio ne estos kaŭzo, ke mi mortigos per malsato post mia reveno al la palvizaĝoj.“

La streĉiĝo de lia mieno cedis. Li donis al mi la manon, kaj diris:

„Viaj vortoj diras al mi, ke mi ne eraris pri vi. La ora pulvoro, kiun la blankaj oroserĉantoj aspiras, estas pulvoro de la morto. Kiu trovas ĝin hazarde, pereos per ĝi. Neniu aspiru ricevi ĝin, ĉar ĝi ne nur mortigas la korpon, sed ankaŭ la animon. Mi volis ekzameni vin. Mi ne estus dononta al vi oron, sed vi ricevu monon, fakte tiun monon, kiun vi meritas.“

„Tio ne eblas plu.“

„Mi ĝin volas, do ĝi eblas. Ni rajdos en la regionon, kie vi laboris. Vi finigos la haltitan laboron, kaj tiam ricevos la salajron, kiu estis promesita al vi.“

Mi vidis al li, mire kaj sendire. Ĉu li ŝercis? Aŭ ĉu tio denove estis ekzameno? Sed tio ne verŝajnis.

„Mia juna blanka frato diras nenion“, li pluis. „Ĉu mia oferto ne bonvenas al li?“

„Eĉ tree bonvenas! Sed mi ne povis kredi, ke vi diris tion serioze.“

„Kial ne?“

„Ĉu mi vere finigu tion, pro kio vi punis miajn blankajn kunlaborintojn per la morto? Mi faru tion, kion vi malŝatis pri mi je nia unua renkonto?“

„Tiutempe vi nur ne havis la permeson de tiuj, kiuj posedas la landon. Nun vi ricevu tiun permeson. Tiu oferto ne venas de mi, sed de mia filo Winnetou. Li diris al mi, ke ĝi ne faros damaĝon al ni, kiam vi finigus la interrompitan laboron.“

„Tio estas eraro. La vojo estos konstruata. La blankuloj venos tutcerte!“

Li mienis serioze, kaj konfesis post iom da tempo:

„Vi pravas. Ni ne povos eviti, ke ili ŝtelos de ni ĉiam denove. Unue ili antaŭsendos malgrandajn grupojn. Tiujn ni povos neigi, sed tio ne ŝanĝos ion. Pli poste ili venos en grandaj aroj, antaŭ kiuj ni cedu, se ni ne volas esti mortpremotaj. Sed ankaŭ vi estas senpoveca kontraŭ tio. Aŭ ĉu vi opinias, ke ili ne venos, se vi rezignas pri finmezuradi la vojon?“

„Ne, tion mi opinias ne. Ni povas fari, kion ni volas, la fajroĉevalo ĉiel rajdos trans tiu ĉi lando.“

„Se ĝi estas tiel, vi povas senpripense akcepti mian oferton. Mi paroladis pri ĝi kun Winnetou. Ni du rajdos kun vi, kaj tridek militistoj akompanos nin. Tio sufiĉos, pro protekti vin, kaj helpi al vi dum via laboro. Poste tiuj tridek viroj eskortos nin tiel for orienten, ĝis ni trovos markitajn vojojn, kaj povos iri per la vapora kanuo al St. Louis.“

„Kion diris mia ruĝa frato? Ĉu mi komprenis lin ĝuste? Li volas iri orienten, ĉu?“

„Jes, kun vi, Winnetou kaj Nŝo-tŝi.“

„Ĉu ankaŭ Nŝo-tŝi?“

„Ankaŭ mia filino. Ŝi volas vidi la grandajn loĝejojn de la palvizaĝoj, kaj resti tie tiel longe, ĝis ŝi tute estiĝis kiel blanka *squaw*.“

Je tiuj vortoj mi verŝajne ne faris tre spritan mienon, ĉar li vidis al mi ridete, kaj pluis:

„Mia juna blanka frato ŝajne miras. Ĉu li do kontraŭas, ke ni volas iri kun li? Li diru ĝin sincere!“

„Kontraŭi, ĉu? Tute ne! Male, mi tre ĝojas pri tio! Kun via akompano, mi revenos en la orienton sen danĝero, jam tial ĝi treege estas bonvena al mi.“

„Howgh!“ li kontente kapskuis. „Vi finigos vian laboron, kaj poste ni iros en la orienton. Ĉu Nŝo-tŝi trovos homojn tie, ĉe kiuj ŝi povos loĝi kaj lerni?“

„Jes. Mi ŝate aranĝos tion. Sed la ĉefo de la apaĉoj konsideru, ke la palvizaĝoj ne havas la saman gastamecon kiel la ruĝaj viroj.“

„Mi scias tion. Kiam palvizaĝoj venas al ni ne kiel malamikoj, ili ricevas ĉion, kion ili bezonas, senke ili devas redoni ion al ni pro tio. Sed kiam ni vizitas ilin, ni pagu ĉion, fakte eĉ je duobla prezo, kiel blankaj vojaĝantoj. Nŝo-tŝi do ankaŭ devos pagi.“

„Tio bedaŭrinde ĝustas, sed vi ne afliktiĝu pri tioo. Per via grandanima oferto, mi gajnos multe da mono. Vi tiam estos miaj gastoj.“

„Uf, uf! Kion mia juna blanka frato pensas pri Intŝu-tŝuna kaj Winnetou, la ĉefoj de la apaĉoj? Mi ĵus diris al vi, ke la ruĝaj viroj konas multajn ejojn, kie troveblas oro. Ekzistas montoj, tra kiuj iras oraj vejnoj, kaj valoj, en kiuj kuŝas la delavita orpulfuro sub la maldika kovrotero. Kiam ni iras al la urboj de la blankuloj, ni ja ne havas monon, sed tiom da oro, ke neniu devas donaci al ni eĉ ne glason da akvo. Eĉ se Nŝo-tŝi devis resti tie plurajn somerojn, mi povus doni al ŝi pli da mono, ol ŝi bezonus. Nur la negastameco de la palvizaĝoj devigas nin iri al la trovejoj de la ora pulvoro. Alikaze mi neniam nek atentis, nek uzas ilin. Kiam mia juna frato pretos por la ekraĵo?“

„Ĉiatempe, ĵus kiam vi volas.“

„Tiukaze ni ne hezitu, ĉar estas la tempo de la malfrua aŭtuno, kiu baldaŭ estos sekvata de la vintro. Ruĝa militisto ne bezonas longan pretiĝon pro rajdadon, eĉ ne pro tia fora. Ni do povas ekraĵi jam morgaŭ, se vi pretas por tio.“

„Mi pretas. Restas nur pripensenda, kion ni kunprenu, kiom da ĉevaloj, kaj—“

„Winnetou zorgos pri tio“, li interrompis miajn vortojn. „Li jam pripensis ĉion. Mia juna blanka frato ne bezonas zorgi pri io.“

Ni forlasis la unuan etaĝon, kaj reiris supren. Kiam mi volis iri en mian loĝejon, Sam Hawkens elvenis.

„Mi diru novaĵon al Vi, *Sir*“, li diris, brile per ĝojo. „Vi miros, ege miros, se mi n'eraras.“

„Ĉu vere?“

„Ni iros for de tie ĉi!“

„Nu! Tion mi jam scias.“

„Vi jam scias, ĉu? Mi volis fari plezuron al Vi per mia novaĵo. Sed do venas tro tarde.“

„Mi ĵus eksciis tion de Intŝu-tŝuna. Kiu ĝin diris al Vi?“

„Winnetou. M'trovis ĝin malsupre apud la akvo, kie li kunirigis la ĉevalojn. Eĉ Nŝo-tŝi kunrajdos! Ĉu Vi scias ankaŭ tion?“

„Jes.“

„Estas stranga penso. Laŭŝajne, ŝi estu restigota en la oriento en pensionaton. Kial, kaj pro kio, tio nekompreneblas al mi, se ne—“

Li haltis meze en la frazo, lasis siajn malgrandajn okulojn vidi al mi de supre malsupren, kaj tiam pluis:

„Se ne — se ne — hm! Nŝo-tŝi eble estiĝu Via Kliuna-ai. Ĉu Vi ne pensas la samon, amata *Sir* kaj Old Shatterhand?“

„Mia Kliuna-ai, do mia luno, ĉu? Tiajn pensojn mi lasas al Vi, Sam. Kiel utilu luno al mi, kiu ĉiam pli malpleniĝas, ĝis ĝi estos tute malaperita? Ne ekideas al mi, perdi mian perukon pro indianino.“

„Ĉu Vian perukon? Aŭskultu, tiu estas tre aĉa ŝerco, pri kiu Vi ne estu fiera. Cetere bonas, ke mia amo al tiu malpleniĝinta luno estis tiel senfeliĉa.“

„Kial?“

„Ĉar mi ĉiukaze ne povis lasi ŝin tie ĉi, sed iam estus devonta kunpreni ŝin. Kiu do rajdas trans la prerio kun novluno! Hihihih! Tiel ja estas ĉiam feliĉero en ĉiu malfeliĉo. Nur unu aĵo ĉagrenas min pri tio.“

Kiu?“

„La bela grizursa felo. Se mi estus prilaborinta ĝin mem, mi nun estus en belega ĉasvestaĵo. Tiel la vestaĵo, kaj ankaŭ la felo estas perdita.“

„Bedaŭrinde! Esperendas, ke pli poste estos refoja ŝanĉo mortigi grizurson. Tiam mi redonacos la felon al Vi.“

„Ĉu Vi al mi? Aŭ sameble mi al Vi! Vi ne pensu, ke la grizaj ursoj nur ĉirkaŭvagis, pro lasi sin pikmortigi de la unua trovebla *greenhorn*. Tiutempe ĝi estis hazardo. Ni tute ne deziru trovi urson, almenaŭ ne en la baldaŭa tempo, kiam ni laboru. Ja estas ega penso, ke Vi mezuradu plu! Per tio Vi havos Vian monon, kaj ni nian salajron. Eble — *thunderstorm!* Mi tute ne envidus pri tio, se mi ĵus estis diveninta ĝuste.“

„Kion Vi divenis?“

„Ke Vi ricevos la tutan monon!“

„Mi ne komprenas Vin.“

„Sed estas tre facile komprenebla. Kiam la laboro estos farita, ĝi ankaŭ estu pagata. La aliaj ne vivas plu. Do iliaj partoj estu kondonataj.“

„Ne iluziu tion, Sam. Oni evitos realigi Vian saĝan penson.“

„Ĉio eblas. Vi nur faru ĝin ĝuste. Vi ja faris la tutan laboron sole. Ĉu Vi volas?“

„Ne. Ne ekideos al mi, ridindigi min, perke mi postulas pli ol konvenas al mi.“

„*Greenhorn*, denove *greenhorn!* Mi diras al Vi, Via modesteco estas en ĉiu lando en la tute malĝusta loko. Mi volas Vian bonon. Tial agu laŭ mia konsilo. La penso estiĝi okcidentulo, pri riu pli bone rezignu. Tiu ne realiĝos en Via tuta vivo, Vi ne havas la plej etan lertecon pro tio. Vi do pensu pri alia kariero, kaj pro tio Vi bezonos monon, kaj poste denove monon. Nun Vi havas la eblecon ricevi belan sumon, se Vi agos ĝuste. Tiukaze Vi ne mizeros en la sekvonta tempo. Se Vi agas ne laŭ mia konsilo, Via branĉo naĝiĝos laŭ la fluo en la malĝustan direkton, mi volis diri, tiukaze Vi malbonŝancos, kaj pereos, kiel fiŝo, kiu hazarde surlandiĝis.“

„Ni atendu. Mi ne iris trans la Misisipo pro estiĝi okcidentulo. Do, se mi ne estos unu, mi ne plendos pri perdita espero. En tiu kazo nur Vi estus bedaŭrinda.“

„Ĉu mi? Kial mi?“

„Ĉar Vi tiel ege klopodis, fari okcidentulon el mi. Mi jam nun povas aŭdi la homojn diri al mi, ke mi verŝajne nur havis nekapablan instruiston.“

„Nekapabla, ĉu? Ĉu mi? Sam Hawkens, kaj nekapabla, hihihih! Mi, nekapabla! Mi eĉ kapablas lasi Vin simple stari tie ĉi, *Sir!*“

Li foriris, sed returniĝis post kelkaj paŝoj, kaj diris: „Memortenu tion: se Vi ne postulos la tutan monon, mi postulos ĝin, kaj donos ĝin en Vian poŝon poste! *Hough!*“

Post tiuj vortoj, li foriĝis per aŝoj, kiuj certe estu dignoplenaj, sed estis la plena malo de tiaj. La kara uleto deziris al mi ĉiun bonon, do ankaŭ la kompletan salajron, sed tio estis tute neebla.

Ĝustis, kion Intŝu-tŝuna diris. Ruĝa militisto ne bezonas longan pretiĝon, eĉ pro plej fora vojaĝo. La vivo en la pueblo ankaŭ hodiaŭ okazigis laŭ sia kutima sinsekvo, senke io indikis pri nia baldaŭa ekrajdo. Ankaŭ Nŝo-tŝi, kiu servis nin dum la manĝado, kondukis kiel ĉiam. Ŝi estis faronta longan kaj danĝeran rajdadon, pro ekkoni la multe laŭditajn bonegecojn de la civilizacio, sed tamen eĉ neniu plej eta nuanco de ekscito estis videbla je ŝi.

Pro la pakado de la iloj, mi ricevis plurajn softajn, lanajn kovrilojn de Winnetou. Kiel kutime ni kunsidis la tutan vesperon, senke nur unu vorto estis parolata pri la intencita rajdado. Kiam mi kuŝiĝis pro dormi, mi tute ne sentis min, kvazaŭ mi estis faronta longan vojaĝon. La trankvileco kaj malvarmsangeco de la indianoj estis infekta.

Je la mateno, mi estis vekata de Sam Hawkens, kiu diris al mi, ke ĉio estis preta pro la ekiro. La tago estis preskaŭ ne komencinta. Estis frua aŭtuna mateno, kies malvarmeto pruvis, ke ĝi estis ĝusta decido, ne plu prokrasti la vojaĝon.

Ni matenmanĝis iomete. Poste ĉiuj enloĝantoj akompanis nin malsupren al la rivero, kiu estu farata ceremonia festo, kiun mi neniam antaŭe vidis, la medicinisto deklaru, ĉu tiu vojaĝo okazos feliĉe aŭ malfeliĉe.

Al tiu ceremonio ankaŭ venis la apaĉoj, kiuj loĝis en la proksimo de la pueblo. Nia granda bovĉaro ankaŭ staris tie. Ĝi ne povis esti kunprenata, ĉar ĝi estis tro pezega. Ĝi estis la ‚sanktaĵo‘ de la medicinisto. Li estis metinta kovrilojn sur ĝi, sub kiuj li agis.

Casta cirklaĵo estis formigita ĉirkaŭ la ĉaro. Tiam komencis la al la ruĝuloj ‚sankta agado‘, kiun mi sed nomis, en miaj pensoj, ‚spektaĵo‘. El la ĉaro sonis teruriga graŭlado kaj kraĉospirado, kvazaŭ pluraj hundoj estus interbatalantaj.

Mi staris inter Winnetou kaj lia fratino. Nŝo-tŝi surmetis virajn vestaĵojn. Ŝia vestaĵo egalas al tiu de ŝia frato. Ankaŭ ŝi ne portis kapkovraĵon. De ŝia zono pendis pluraj saketoj, kun diversaj enhavo. Tranĉilo kaj pistolo ankaŭ estis en ĝi. Sur ŝia dorso pendis pafilo. Ŝia vestaĵo estis nova, kaj ornamita per multkoloraj franĝoj kaj brodaĵoj. Ŝi aspektis tiel militeca, kaj tamen tiel knabineca kaj ĉarma, ke ĉiuj vidoj estis direktitaj al ŝi. Ĉar mi surhavis la vestaĵon, kiu estis donacita al mi, ni tri estis preskaŭ same vestitaj.

Kiam la graŭlado komencis, mi verŝajne ne faris speciale ceremonian mienon, ĉar Winnetou diris:

„Mia frato ne jam konas tiun riton. En liaj pensoj, li certe ridas pri ni.“

„Neniu religia rito priridindas al mi, eĉ ne, se mi ne povas kompreni ĝin tiel komplete.“

„Kion vi aŭdos kaj vidos tie ĉi, ne estas sovaĝula burleskaĵo, sed ĉiu movo kaj ĉiu sono de la medicinisto havas signifon. Kion vi aŭdas nun, estas la kverelantaj voĉoj de la bona kaj la malbona sorto.“

Simile, li ankaŭ klarigis al mi la puan sinsekvon de la medicina danco.

La graŭladon sekvis kroma kriaĉado, kiu interŝanĝiĝis per pli dolĉaj sonoj. La kriaĉo eksonis ĉiun fojon, kiam la medicinisto ekkonis malbonajn antaŭsegnojn, kaj la pli dolĉaj tiam, kiam li antaŭvidis bonaĵojn.

Kiam tio estis daŭrinta kelkan tempon, li subite ekvenis salte el la ĉaro, kaj vokege ĉirkaŭkuris en cirklo kiel frenezulo. Iom post iom liaj paŝoj malrapidiĝis. La vokegado ĉesis. Li komencis malrapidan, groteskan dancon, dum kiu li kovris sian vizaĝon per terurige aspektanta masko, kaj fiksigiĝis ĉiajn mirigajn objektojn sur sian korpon. Tiun dancon li akompanis per monotona kantado. Kantado kaj dancado estis komence pli movecaj, kaj iom post iom trankviliĝis, ĝis ili estis ĉesintaj, kaj la medicinisto sidiĝis sur la teron. Kun la kapo inter la genuoj, li sidis kelkan tempon silente kaj senmove, ĝi li subie eksaltis, kaj laŭte deklaris la rezulton de sia pensa laboro:

„Aŭskultu, vi gefiloj de la apaĉoj! Tio estas, kion Manitu, la Granda Spirito, lasis esplori min. Intŝu-tŝuna kaj Winnetou, la ĉefoj de la apaĉoj, kaj Old Shatterhand, kiu estiĝis nia blanka ĉefo, forrajdos kun iliaj ruĝaj kaj blankaj militistoj pro akompani Nŝo-tŝin, la junan filinon de nia tribo, al la loĝejoj de la palvizaĝoj. La bona Manitu pretas gardi ilin. Ili spertos kelkajn aventurojn, sen havi damaĝon de tiuj, kaj ili sane revenos al ni. Ankaŭ Nŝo-tŝi, kiu restos pli longan tempon ĉe la palvizaĝoj, revenos feliĉe. Nur unu el ili ni neniam revidos.“

Li silentis, kaj mallevis la kapon, pro esprimi sian malgajecon pri tiu fakto.

„Uf, uf, uŝ!“ la ruĝuloj vokis scivole kaj bedaŭre, sed neniu riskis demandi, pri kiu li parolis.

Ĉar la medicinisto restadis pli longan tempon en sia silento, la paciento forlasis mian malgrandan Sam Hawkens-on. Li demandis:

„Nu, kiu ĝi estas, kiu ne revenos? La viro de la medicino ĝin diru al ni!“

La medicinisto faris rifuzan mansignon, nun atendis des pli longe, tiam levis la kapon, direktis sian vidon al mi, kaj vokis:

„Estus estinta pli bone, se mi ne estus demandita pri tio. Mi ne volis nomi lin. Sed nun Sam Hawkens, la scivolema palvizaĝo, devigis min diri ĝin. Estas Old Shatterhand, kiu ne revenos. La morto venos al li post mallonga tempo. La aliaj, al kiuj mi anoncis feliĉan revenon, evitu lian proksimon, se ili ne volas perdi iliajn vivojn kune kun li. Ĉe li ili estas en danĝero, sed for de li ĉiam en saveco. Tion diris la Granda Spirito. Howgh!“

Post tiuj vortoj, li reiris en la ĉaron. La ruĝuloj rigardis min eviteme, kaj murmuretis esprimon de bedaŭro.

Inter ili mi nun valoris kiel damnita. Estis pli bone eviti min.

„Kiajn ideojn tiu ulo havas?“ Sam diris al mi. „Ĉu ekmorti, ĉu Vi? Tio ekideus al neniu alia homo, nur al tiu stultulo. Tiu ideo falis el lia propra malforta cerbo. Kiel li nur povis ekhavi ĝin?“

„Pli bone demandu Vin, kiun intencon li havis!“ mi respondis. „Li ne ŝatas min, kaj timas mian influon al la ĉefo, kiu povus vastiĝi baldaŭ al la tuta tribo. Nun li uzis la bonvenan ŝancon malaltigi tiun influon.“

„Ĉu mi iru, kaj planti kelkajn vangofrapojn en lian ruĝan vizaĝon, *Sir*?“

„Ne faru stultaĵojn, Sam! La afero tute ne indas ekscitiĝon.“

Intŝu-tŝuna, Winnetou kaj Nŝo-tŝi estis vidintaj konsternite unu al la alia, kiam ili estis aŭdintaj la profetaĵon de la medicinisto. Ĉu ili kredis al la vereco de la orakolaĵo aŭ ne, tio egalas. Ĉiukaze ili konis la efikon de la antaŭdiro al iliaj anoj. Tridek viroj rajdu kun ni. Se ili kredis, ke mia proksimo estus danĝera, ĉiaj malagrabraĵoj estis neeviteblaj. Ĉar la eldiro de la medicinisto ne estis ŝanĝebla, oni nur povis agi kontraŭ tio, perke la estroj staris klarvideble je mia flanko kiel antaŭe, kaj ke ili montris tion al iliaj anoj. Tial ili ambaŭ prenis miajn manojn, kaj Intŝu-tŝuna diris tiel laŭte, ke ĉiuj ĝin aŭdis:

„Miaj ruĝaj gefratoj aŭdu miajn vortojn! Nia medicinfrato posedas la vidkapablon pro esplori la sekretojn de la estonteco. Tre ofte okazis, kion li antaŭdiris. Sed ne ankaŭ spertis, ke li povas erari. En la tempo de la granda sekeco, li provis allogi la pluvon, sed la pluvo ne venis. Antaŭ la lasta forraĵo kontraŭ la komanĉoj, li anoncis, ke ni havus grandan akiron. Sed la venko, kiun ni sukcesis, havigis nin nur kelkajn maljunajn ĉevalojn, kaj tri malbonajn pafilojn. Kiam li diris al ni, en la antaŭlasta aŭtuno, ke ni iru al la akvo de la Toyah, se ni volus ĉasi multajn bubalojn, ni agis laŭ liaj vortoj. Sed ni ĉasis nur tiom malmultan viandon, ke en la vintro preskaŭ estis malsatego. Mi povus doni al vi pli da tiaj ekzemploj, kiuj pruvas, ke lia okulo estas malklara de tempo al tempo. Tial bone eblas, ke li eraras ankaŭ nun, pri nia frato Old Shatterhand. Mi prenas liajn vortojn tiel, kvazaŭ ili neniam estis diritaj, kaj postulas de miaj gefratoj, agi same. Ni atendu, ĉu ili fakte realiĝos.“

Tiam mia malgranda Sam Hawkens elamasigis, kaj vokis:

„Ne, ni ne devas atendi. Ekzistas rimedo tuj ekscii, ĉu la medicinisto anoncis la verecon.“

„Pri kiu rimedo parolas mia blanka frato?“ Intŝu-tŝuna demandis.

„Mi ĝin diros al vi. Ne nur la ruĝuloj, sed ankaŭ la blankuloj havas iliajn medicinistojn, kiuj kapablas esplori la estonton. Mi, Sam Hawkens, estas la plej fama el ili!“

„Uf, uf!“ la apaĉoj vokis.

„Jes, vi miras, ĉu ne? Ĝis nun, vi pensis min esti nur normala okzidentulo, ĉar vi ne jam ne komplete konis min. Sed mi kapablas pli ol manĝi ĉerizojn, kaj vi konu min pli bone, hihihih! Kelkaj el miaj ruĝaj militistoj prenu iliajn tomahokojn, kaj fosu malvastan, profundan truon en la teron.“

„Ĉu mia blanka frato volas vidi en la internon de la tero?“ Intŝu-tŝuna demandis.

„Jes. La estonto estas kaŝata en la sino de la tero. Kelkfoje ĝi ankaŭ estas legebla per la steloj. Sed ĉar mi ne vidas stelojn je tiu hela tago, kiujn mi povus demandi, mi vidu en la teron.“

Kelkaj indianoj obeis lian postulon, kaj fosis truon per iliaj militaj hakiloj.

„Ne faru sensecaĵojn, Sam“, mi flustris al li. „Kiam la ruĝuloj rimarkos, ke Vi trompas ilin, Vi plimalbonigas la aferon anstataŭ plibonigi ĝin!“

„Sensecaĵojn, ĉu? Do kion faris la medicinisto? Nu, ankaŭ sensecaĵojn! Aĵn kion li povas kaj rajtas, tion povas kaj rajtas ankaŭ mi, se mi n'eraras, estimata *Sir*. Mi scias, kion mi faras.“

Se ni ne agas nun, ni havos malagrablajojn kun la ruĝuloj, kiuj akompanu nin. Vi povas esti certa pri tio.“

„Mi ja ankaŭ estas konvinkita pri tio. Sed mi petas Vin, almenaŭ ne fari ion priridindan!“

„Ho, la afero estos tre serioza. Ne afliktiĝu pri tio!“

Malgraŭ tiu aserto, mi ne sentis min tute agrable. Mi konis lin tro bone. Li estis ŝercemulo. Tial mi ŝate estus avertinta lin eĉ pli insiste, sed li lasis min stari, kaj iris al la indianoj, pro diri al ili, kiel profunde ili fosu la truon.

Kiam ili estis finiginta ĝin, li forpelis ilin, kaj demetis sian malnovan, ledan ĉasĉemizon. Post li referme estis butonuminta ĝin, kaj metinta ĝin sur la teron, la malnova vestaĵo staris tiel neflekseble, kvazaŭ ĝi estis farita el lado aŭ ligno. Li metis la ĉemizon sur la truon, faris signifoplenan geston, kaj vokis:

„La viroj, virinoj kaj infanoj de la apaĉoj vidos, kion mi nun faros, kaj eble ili miros pri tio. La tero malfermigos al mi sian sinon, kiam mi estos parolinta miajn sorĉajn vortojn, tiel ke mi ekscios ĉion, kio okazos al ni en la baldaŭa tempo.“

Nun li malproksimiĝis iomete de la truo, kaj tiam iris ĉirkaŭ ĝi, malrapide kaj per solenecaj paŝoj, dum kio li deklamis, je mia hororo, la multobligajn tabelojn de unu ĝis naŭ. Feliĉe li faris tion tiel rapide, ke la ruĝuloj tute ne rimarkis, kion li parolis. Kiam li estis finiginta la naŭan, liaj paŝoj ĉiam pli rapidiĝis, ĝis li galopis kure ĉirkaŭ la ĉemizo. Dum tio, li aŭdigis laŭtan graŭlon, kaj movis siajn brakojn kiel ventmueleroj. Kiam li estis kurinta kaj graŭlinta, ĝis li ne plu povis spiri, li iris al sia ĉemizo, kliniĝis kelkajn fojojn, kaj tiam metis sian kapon de supre en la ĉemizon, pro vidi tra ĝi en la truon.

Mi timis pri la sukceso de tiu infanaĵo. Mi ĉirkaŭrigardis, kaj rimarkis je mia trankviliĝo, ke la ruĝuloj ĉiuj rigardis la aferon per granda seriozeco. Ankaŭ la vizaĝoj de la du ĉefoj ne videbligis malakcepton. Sed mi estis konvinkita, ke Intŝu-tŝuna sciis ekzakte, ke la agado de Sam estis nura aktorado.

La kapo de Sam estis en la koluma malfermaĵo de lia ĉemizo kelkajn minutojn. Dum tiu tempo, li iam kaj iam movis siajn brakojn, kvazaŭ li volis signi, ke io tre grava kaj signifoplena okazis antaŭ liaj okuloj. Finfine li eltiris la kapon. Lia mieno estis seriozega. Li malferme rebutonumis la ĉemizon, resurmetis ĝin, kaj ordonis:

„Miaj ruĝaj fratoj refermu la truon. Mi ne rajtas diri ion, kiam ĝi ankoraŭ estas malferma!“

Kiam la truo estis replenigita, Sam ege enspiris, kvazaŭ li sentus sin tre elĉerpita, kaj vokis:

„Via ruĝa medicinisto misvidis. Okazos ekzakte la malo de tio, kion li diris. Mi vidis ĉion, kion la venonta semajno portos al ni, sed ne estas permesata al mi eldiri tion. Nur parton de tio mi rajtas raporti. Mi vidis pafilojn en la truo, kaj aŭdis pafojn. Ni do devos sukcesi batalojn. La lasta pafado estis tiu de la ursomortigilo de Old Shatterhand. Aĵn kiu pafas laste, ja ne povas esti pafata kaj mortigata, sed certe venkis. Venos malbono al miaj ruĝaj fratoj. Sed ili povas eviti tion, per resti en la proksimo de Old Shatterhand. Sed kiam ili faros, kion la medicinisto postulis, ili pereos. Mi finparolis. *Hongh!*“

La efiko de tiu profetaĵo estis en la unua momenti ekzakte tiu, kiun Sam Hawkens estis intencinta. La ruĝuloj kredis al li, tio estis videble. Ekspektante ili vidis al la ĉaro. Ili certe atendis, ke la medicinisto elvenis pro defendiĝi. Sed li ne aperis, do ili supozis, ke li sentis sin venkita. Sam Hawkens venis al mi, vidis al mi ruzece per siaj brilaj okuletoj, kaj demandis:

„Nu, *Sir*, kiel mi sukcesis mian taskon?“

„Kiel vera, rekta ĉarlatanisto.“

„*Well!* Do bone, ĉu ne?“

„Jes. Almenaŭ ĝi ŝajnas, kvazaŭ Vi atingis Vian celon.“

„Matingis ĝin tuttrafe. La medicinisto estas venkata. Li ne lasas sin vidi, nek aŭdi.“

Winnetou nur rigardis nin per trankvila, kaj signifoplena vido. Sed Intŝu-tŝuna venis al ni, kaj diris al Sam:

„Mia blanka frato estas saĝa viro. Li metis la fortecon el la vortoj de nia medicinisto, kaj li posedas ĉemizon, en kiu estas gravaj omenaĵoj. Tiu ĉemizo famiĝos, de unu granda akvo ĝis la alia. Sed Sam Hawkens iom trois per sia profetado.“

„Ĉu trois? Kial?“ la malgrandulo scivolis.

„Estus sufiĉinta diri, ke Old Shatterhand ne alportos danĝeron al ni. Kial Sam Hawkens pluis, ke ni spertos malbonon?“

„Ĉar mi ĝin vidis en la truon.“

Intŝu-tŝuna mansignis nekrede, kaj parolis:

„La ĉefo de la apaĉoj scias, kion li kredis, Sam Hawkens povas certi pri tio. Ne necesis paroli pli malbonaj aĵoj, kaj plenigi la korojn de niaj homoj per aflikto.“

„Per aflikto, ĉu? La militistoj de la apaĉoj estas bravaj viroj, kiuj ne timas.“

„Ili ne timas. Tion ili pruvos, se nia rajdado renkontigos nin kun malamikoj. Ni nun komencu ĝin.“

La ĉevaloj estis alvenigitaj. Estis pluraj ŝarĝoĉevaloj inter ili, el kiuj kelkaj portis miajn mezurilojn. La aliaj estis ŝarĝitaj per manĝaĵoj, kaj aliaj necesaj aĵoj.

Estas kutimo de la indianoj, ke la forrajdantaj militistoj estas akompanataj kelkan distancon de la hejmmrestontoj. Tio hodiaŭ okazis ne, ĉar Intŝu-tŝuna ne volis tion. La tridek ruĝuloj, kiuj rajdis kun ni, eĉ ne adiaŭis iliajn edzinojn kaj infanojn. Certe ili estis farintaj tion antaŭe. Ilia militista digno ne permesis tion en publiko.

Nur unu adiaŭis per vortoj: Sam Hawkens. Li vidis Kliuna-ain staro en la virinaso, irigis sian mulon al ŝi, kaj demandis:

„Ĉu vi aŭdis, kion mi vidis en la truon?“

„Vi ĝin diris, kaj mi ĝin aŭdis“, ŝi respondis.

„Mi estus povinta diri multon pli, ekzemple ankaŭ pri vi.“

„Ĉu pri mi? Ĉu ankaŭ mi estis en tiu truon?“

„Jes. Mi vidis vian tutan estonton antaŭ mi. Ĉu mi rakontu ĝin al vi?“

„Jes, bonvolu!“ ŝi diris rapide kaj haste. „Kion la estonto donos al mi?“

„Ĝi ne donos ion al vi, sed ravas ion de vi, kio estas tre valora kaj kara al vi.“

„Kio estas tio?“ ŝi volis scii timete.

„Viaj haroj. Vi perdos ilin post kelkaj lunoj, kaj vi havos terurige kalvan kapon, kiel la luno, kiu ja ankaŭ ne havas harojn. Tiam mi sendos mian perukon al vi. Fartu bone, vi malfeliĉa luno!“

Li ridante foririgis sian mulon, kaj ŝi deturniĝis, hontante, ke ŝi ridindiĝis per sia scivolo.

La aranĝo, en kiu ni rajdis, formiĝis tute per si mem. Intŝu-tŝuna kaj Winnetou estis je la antaŭo, kune kun Nŝo-tŝi kaj mi. Malantaŭ ni estis Hawkens, Parker kaj Stone, kaj ilin sekvis la tridek apaĉoj, kiuj kondukis la ŝarĝoĉevalojn.

Nŝo-tŝi sidis sur sia ĉevalo en vira maniero. Ŝi estis bonega kaj persisteca rajdanto. Sambone ŝi kapablis uzi siajn armilojn. Kiu estus renkontinta nin sen scii ŝin, certe pensu, ke ŝi estus la pli juna frato de Winnetou. Sed al pli arda okulo, ne kaŝeblis la virina softeco de ŝia vizaĝo, kaj la korpaj formoj. Ŝi estis bela, spite sia viraj vestaĵoj, kaj sia vira maniero rajdi.

La unuaj tagoj de nia rajdado pasis sen rakontinda okazo. La apaĉoj tiutempe bezonis kvin tagojn de la ejo de la atako ĝis la pueblo apud la Rio Pecos. La transporto de la mortitoj kaj lezotoj ja estis malrapidigintaj la rajdadon.

Jam tri tagojn poste ni atingis la lokon, kie Klekih-petra estis murdita de Rattler. Tie la noktorestejo estis pretigata. La apaĉoj metis kelkajn ŝtonojn sur aliajn, pro memorigaĵo. Winnetou estis eĉ pli serioza ol kutime je tiu loko. Mi rakontis al lia patro kaj lia fratino, kion Klekih-petra rakontis al mi pri sia antaŭa vivo.

Je la sekvinta mateno ni plurajdis al la ejo, kie ni mezuta laboro estis ĉesigita per la atako. Le mezuraj fostoj ankoraŭ staris. Mi povis tuj komenci, sed antaŭe endis al mi fari ion pli gravan.

Tiutempe, post la batalo, ne ekideis al la apaĉoj enterigi la mortajn blankulojn kaj kajovajojn. Ili lasis la korpojn kuŝi, kie ili estis. Kion ili ne faris, tion faru la vulturoj kaj la aliaj sovaĝaj bestoj. Estis teruriga laboro al mi, Sam, Dick kaj Will, kolekti la restaĵojn de la mortuloj, kaj meti ilin en kunan tombon. La apaĉoj ne partoprenis en tio.

Per tio la tago pasis. Maljam la sekvintan tagon, mi komencis mian laboron. Krome la militistoj, kiuj postportis la ilojn, kaj speciale Winnetou helpis al mi, kaj lia fratino preskaŭ neniam foriris el mia proksimo. La neokupitaj ruĝuloj vagis en la ĉirkaŭo, kaj alportis plurajn viandaĵojn je la vespero.

La mezurado antaŭiĝis bone. Spite la malfacilaĵoj de la ejo, mi atingis la ligon al la sekvanta etapo jam post tri tagoj. Je la kvara tago mi kompletigis miajn desegnojn kaj notojn. Tiam mi estis finiginta, kaj tio estis bona, ĉar la vintro venis rapide. La noktoj jam estis tre malvarmaj, tiel ke ni ne lasis la fajrojn estingiĝi ĝis la mateno.

Kiam mi diris, ke la apaĉoj helpis al mi, mi sede ne povas samtempe aserti, ke ili faris tion ŝate. Ili obeis la ordonojn de iliaj ĉefoj. Alikaze ili estus helpinta al mi tute ne. Estis rimarkebla, ke ili ĝojis, se ili tempe ne plu estis bezonataj. Kaj kiam ni sidis kune je la vespero, la tridek *indsman*-oj restis ĉiam en pli fora malproksimo, ol la respekto antaŭ iliaj ĉefoj ĝin postulis. Sam ankaŭ rimarkis tion, kaj komentis:

„Tiu ruĝuloj ja vere ne ŝate laboras. Ja estas, kaj ĉiam restas vera: la indiano estas farema ĉasisto, kaj brava militisto, sed maldiligentulo en ĉiuj aliaj aferoj. Laboro ne gustas al li.“

„Kion ili faras por mi, tute ne estas peno, kaj ne meritas la vorton laboro. Ilia kontraŭemo certe havas alian kaŭzon. Ŝajne ili kredas al la profetaĵo de ilia medicinisto plie, ol al Via antaŭdiro, kara Sam.“

„Eble. Sed estus stultaĵo de ili.“

„Ankaŭ mia laboro ja estas teruraĵo al ili. Tiu lando estas ilia posedaĵo, kaj mi ĝin mezuras por aliaj homoj, iliaj malamikoj. Vi pensu ankaŭ pri tio, Sam.“

„Sed iliaj ĉefoj ja ĝin volas!“

„Certe. Sed tio ne havas la konsekvencon, ke ili konsentas. Kaŝe ili kontraŭas. Kaj kiam mi rigardas ilin kunsidi kaj interparoli mallaŭte, mi povas ekkoni per iliaj mienoj, ke ili parolas pri mi, kaj certe ne iun amikecaĵon.“

„Ŝajnas ankaŭ al mi. Sed ĝi povas egali al ni. Kion ili pensas kaj parolas, tio ne doloras nin. Intŝu-tŝuna, Winnetou kaj Nŝo-tŝi estas je nia flanko, kaj ni ne povas plendi pri ili.“

Li pravis. Winnetou kaj sia patro traktis nin per vere frateca helpemo, kaj la indianino legis ĉiun mian deziron en miaj okuloj. Estis, kvazaŭ ŝi eksciis ĉiun mian penson. Ŝi estis akra rimarkanto, kaj atenta aŭskultanto. Je mia plezuro, mi rimarkis, ke mi neintencite estis ŝia instruisto, de kiu ŝi lernis per entuziasmo. Kiam mi parolis, ŝi aŭskultis koncentrate, kaj kion mi faris, ŝi faris poste ekzakte same, eĉ se ĝi kontraŭis al la kutimoj de ŝia raso. Ŝi ŝajnis ĉeesti nur pro mi, kaj zorgis pri mia komforteco kaj bonfarto, eĉ plie ol mi mem.